# Leciono 5



Co-funded by the Erasmus+ Programme of the European Union

Tiu ĉi projekto estas financata per subteno de Eŭropa Komisiono. Tiu ĉi publikaĵo respegulas nur vidpunkton de la aŭtoro, pro tio la Komisiono ne povas esti respondeca pri ajna uzado de informoj, kiuj aperas ĉi tie.

https://lernu.net/instruado?lang=eo

La tuta enhavo, se ne estas indikite ie eksplicite io alia, apartenas al *lernu.net* kaj estas publikigita sub la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Nekomerce-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda.

# Gramatiko

### Tabelvortoj

Pristudu la tabelon kaj rimarku kiel regule kaj logike ĝi estas kunmetita: signifo de kiu ajn el 45 vortoj en la tabelo povas esti derivita el la ĝenerala signifo de komenca kaj fina parto de la vorto. Memoru speciale la sekvajn vortojn:

| | KI-<br>**demandovorto, rilata vorto, ekkria vorto** | TI-<br>**montrovorto** | ĈI-<br>**tutampleksa vorto** | NENI-<br>**nea vorto** | I-<br>**nedifinita vorto** |
|---|---|---|---|---|---|
| **-U**<br>**individuo, individua aĵo, individua afero** | kiu<br>Demandas pri la identeco de unu el pluraj konataj personoj, aĵoj aŭ aferoj. | tiu<br>Montras unu certan el pluraj konataj personoj, aĵoj aŭ aferoj. | ĉiu<br>Montras unuope kaj senescepte la individuojn de grupo da personoj, aĵoj aŭ aferoj. | neniu<br>Neas la individuojn de grupo da personoj, aĵoj aŭ aferoj. | iu<br>Montras nekonatan aŭ nedifineblan individuan personon, aĵon aŭ aferon. |
| **-O**<br>**afero** | kio<br>"kiu afero, kia afero" | tio<br>"tiu afero" | ĉio<br>"ĉiu afero, ĉia afero" | nenio<br>"neniu afero, nenia afero" | io<br>"iu afero, ia afero" |
| **-A**<br>**eco, speco** | kia<br>"de kiu speco, havanta kiun econ" | tia<br>"de tiu speco, havanta tiun econ" | ĉia<br>"de ĉiu speco, havanta ĉiun econ" | nenia<br>"de neniu speco, havanta neniun econ" | ia<br>"de iu speco, havanta iun econ" |
| **-EL**<br>**maniero, grado** | kiel<br>"en kiu maniero aŭ grado" | tiel<br>"en tiu maniero aŭ grado" | ĉiel<br>"en ĉiu maniero" | neniel<br>"en neniu maniero" | iel<br>"en iu maniero aŭ grado" |
| **-E**<br>**loko** | kie<br>"en kiu loko" | tie<br>"en tiu loko" | ĉie<br>"en ĉiu loko" | nenie<br>"en neniu loko" | ie<br>"en iu loko" |
| **-AL**<br>**kaŭzo** | kial<br>"pro kiu kaŭzo, pro kiu motivo, pro kio" | tial<br>"pro tiu kaŭzo, pro tiu motivo, pro tio" | ĉial<br>"pro ĉiu kaŭzo, pro ĉiu motivo, pro ĉio" | nenial<br>"pro neniu kaŭzo, pro neniu motivo, pro nenio" | ial<br>"pro iu kaŭzo, pro iu motivo, pro io" |
| **-AM**<br>**tempo, fojo (okazo, kondiĉo)** | kiam<br>"en kiu tempo, en kiu fojo" | tiam<br>"en tiu tempo, en tiu fojo" | ĉiam<br>"en ĉiu tempo, en ĉiu fojo" | neniam<br>"en neniu tempo, en neniu fojo" | iam<br>"en iu tempo, en iu fojo" |
| **-OM**<br>**kvanto (emfazita grado)** | kiom<br>"kiel multe, kianombre, kiakvante" | tiom<br>"tiel multe, tianombre, tiakvante" | ĉiom<br>"la tuta kvanto" | neniom<br>"nenianombre, neniakvante, neniamezure" | iom<br>"ne tre multe sed ankaŭ ne malmulte" |
| **-ES**<br>**posedanto (senca objekto, senca subjekto)** | kies<br>"(la)... de kiu" | ties<br>"(la)... de tiu" | ĉies<br>"(la)... de ĉiu" | nenies<br>"(la)... de neniu" | ies<br>"(la)... de iu" |

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| ĉ-io | = | ĉio | ĉ-iam | = | ĉiam |
| ĉ-iu | = | ĉiu | iom | = | iom |
| ĉ-iuj | = | ĉiuj | | | |

La vortoj el la tabelo povas ankaŭ ricevi la finaĵojn -j (pluralo) kaj -n (akuzativo):

- la finaĵon -j povas havi vortoj, kiuj finiĝas je -u kaj -a
- la finaĵon -j povas havi vortoj, kiuj finiĝas je -o, -u, -a kaj -e

| | | |
|---|---|---|
| kio | = | kio |
| kion | = | kion |
| Kio estas tio? Tio estas kuko. | = | Kio estas tio? Tio estas kuko. |
| Kion vi manĝas? Kukon mi manĝas. | = | Kion vi manĝas? Kukon mi manĝas. |

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| kiu | = | kiu | Kiuj estas viaj amikoj? | = | Kiuj estas viaj amikoj? |
| Kiu staras kun li? | = | Kiu staras kun li? | Kiujn librojn vi legis? | = | Kiujn librojn vi legis? |
| Kiun mi vidas? | = | Kiun mi vidas? | | | |

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| kia | = | kia | Kiaj estas ŝiaj leteroj? | = | Kiaj estas ŝiaj leteroj? |
| Kia estas la vetero? | = | Kia estas la vetero? | Kiajn fotojn vi faris? | = | Kiajn fotojn vi faris? |
| Kian aŭton vi havas? | = | Kian aŭton vi havas? | | | |

| | | |
|---|---|---|
| kie | = | kie |
| kien | = | kien |
| Kie mi estas? | = | Kie mi estas? |
| Kien vi iras? | = | Kien vi iras? |

La vortojn eblas kombini kun prepozicioj:

| | | |
|---|---|---|
| al kiu | = | al kiu |
| kun kiu | = | kun kiu |
| al tiu | = | al tiu |
| inter tiuj | = | inter tiuj |

### Komparado

Komparativo formiĝas per la vorto pli:

| | | |
|---|---|---|
| pli bona | = | pli bona |
| pli granda | = | pli granda |

Superlativo formiĝas per la vorto plej:

| | | |
|---|---|---|
| plej bona | = | plej bona |
| plej granda | = | plej granda |

En komparo kun iu/io oni uzas ol:

| | | |
|---|---|---|
| pli bona ol vi | = | pli bona ol vi |

Kaj en superlativo oni uzas el:

| | | |
|---|---|---|
| la plej bona el ĉiuj | = | la plej bona el ĉiuj |

En superlativo de adjektivoj antaŭ plej ĉiam devas esti la artikolo la.

La vortetoj pli kaj plej estas uzataj ankaŭ ĉe adverboj. La reguloj estas samaj, krom unu diferenco: antaŭplej ne aperas la.

| | | |
|---|---|---|
| pli rapide | = | pli rapide |
| plej rapide | = | plej rapide |

### dum

La vorteto dum indikas tempan daŭron kaj povas esti uzata kaj kiel prepozicio kaj kiel konjukcio:

| | | |
|---|---|---|
| Li sidas dum la manĝo. | = | Li sidas dum la manĝo. |
| Ŝi skribas dum li legas. | = | Ŝi skribas dum li legas. |

### ĉi

La vorto ĉi estas uzata kun ti-vortoj el korelativa tabelo por indiki proksimecon:

| | | |
|---|---|---|
| tie | = | tie |
| tiu | = | tiu |
| tiu ĉi / ĉi tiu | = | tiu ĉi |
| tie ĉi / ĉi tie | = | tie ĉi |

### -ind-

La sufikso -ind- indikas, ke valoras (indas) fari ion:

| | | |
|---|---|---|
| aŭskultinda | = | aŭskultinda |
| leginda | = | leginda |
| bedaŭrinde | = | bedaŭrinde |
| nedankinde | = | nedankinde |

### kioma?

La demandovorto kioma estas uzata, kiam oni demandas pri la tempo indikata de horloĝo:

| | | |
|---|---|---|
| Kioma horo estas? | = | Kioma horo estas? |

# Bloko 19 (sesioj 37-38)

## Lernoceloj

- lerni kiel kompari en Esperanto (komparativo, superlativo)
- ripeti la jam konatajn vortojn, kiuj rilatas kun komparado (kiu, tia, tie, ktp.)

## Bezonataj instruiloj

- komputilo por ludi sonon

## Pretigado

- Sonoj **1, 2, 3**
- Kopioj de **M1**
- Kopioj de **M2**
- Ekzerco **M3**
- Kopioj de **M4**
- Kopioj de **M5**

## Novaj vortoj

| | | |
|---|---|---|
| sinjoro | = | sinjoro |
| horo | = | horo |
| vendi | = | vendi |
| komenci | = | komenci |
| aŭto | = | aŭto |
| pli | = | pli |
| plaĉi | = | plaĉi |
| ol | = | ol |
| la plej | = | la plej |
| ĉi | = | ĉi |
| aŭskulti | = | aŭskulti |
| pli ol | = | pli ol |
| forgesi | = | forgesi |
| plej el | = | plej el |
| helpi | = | helpi |

## Lernplano

| | |
|---|---|
| 10 min | Disdonu **M1** kaj aŭskultu Sonon **1**. Legu kaj traduku la tekston kune. Petu lernantojn legi po 2 frazoj kaj traduki ilin denove. Kiam ili atingas finon de la teksto, ili rekomencas sed ĉi-foje sen traduko. La instruisto helpas nur kun ĝusta elparolo kaj, se necese, kun tradukado.<br>Helpu la lernantojn traduki frazojn enhavantajn komparativon kaj superlativon: la plej bona el, pli rapida ol ... |
| 5 min | Nelingva paŭza ludo |
| 20 min | Disdonu la dialogon **M2**.<br>Dividu la lernantojn en duopojn kaj petu ilin legi la dialogon kaj traduki ĝin. Petu unu duopon laŭtlegi la dialogon kaj traduki ĝin linion post linio. Helpu ilin kun tradukado, se necese. Poste petu tiun duopon ludi la dialogon sen traduki ĝin denove. Se estas tempo, vi povas peti aliajn duopojn ludi la dialogon.<br>Klarigu ke adjektivoj kaj adverboj en komparativo kaj superlativo ne ŝanĝiĝas kaj ke oni nur aldonas pli aŭ plej (bona – pli bona, plej bona, bone – pli bone, plej bone). |
| 10 min | Paŭzo |
| 20 min | Disdonu **M3**. Dividu la lernantojn en triopojn aŭ kvaropojn. Ĉiu grupo devas ligi la esprimojn kun tabelvortoj. Vi povas fari ludon: la plej rapida grupo gajnas.<br>Konsciigu la lernantojn, ke la titoloj en la tabelo estas iom malsamaj inter si, ekzemple kiu – tiu, ktp. La lernantoj atentu pri la simileco inter la vortoj en ĉiu duopo. La kialo de tio estos klarigita pli detale en la venontaj blokoj. |
| 5 min | Nelingva paŭza ludo |
| 10 min | Disdonu **M4**. Petu la lernantojn traduki la kanton kune kaj kantu ĝin kune 2-3-foje. |
| | Donu hejmtaskojn |

## M1 Teksto

**Nova aŭto (1-a parto)**

Sinjoro Rapid, amiko de Marko, eniris vendejon de aŭtoj. Tie li vidas belan sinjorinon, kiu plaĉas al li. Vendisto venas al li. Sinjoro Rapid demandas:

– Kiu aŭto estas la plej bona?

– Tiu ĉi estas la plej bona el ĉiuj.

– Ĉu ĝi estas rapida?

– Ĝi estas pli rapida ol aliaj.




**A** Mi aŭdis ke vi volas novan aŭton. Ĉu estas vero?

**B** Jes, mia aŭto estas malnova kaj malbona.

**A** Ĉi tie estas aŭtovendejo. Kiu aŭto plej multe plaĉas al vi?

**B** Tiu ĉi. Ĝi estas pli bona ol mia.

**A** Ho, 20 000 eŭroj! Multekosta!

**B** Mi ne havas sufiĉan monon por ĝi. Mi aĉetos iun malpli kostan.

**A** Sed ĝi estas tre rapida.

**B** Mi ne devas havi la plej rapidan aŭton el ĉiuj.

**A** Ĉu vi ne ŝatas vojaĝi pli rapide ol aliaj?

**B** Ne. Mi ne volas akcidenton.

## M3 Ekzerco

Metu la esprimojn en la ĝustan grupon: vendisto, forta, riĉa, la plej bona, lingvo, en vendejo, pli bela, en la hejmo de Marko, aŭto, en sportejo, domo, kafo, sur tablo, amiko, en nia lernoĉambro, en via lernolibro, kelnero, sur papero, kuko, Marko, malpli granda, sinjorino, vizaĝo, malvarma, letero, sportisto, frato, pli rapida

| Kiu? Tiu! | Kie? Tie! | Kio? Tio! | Kia? Tia! |
|---|---|---|---|
| | | | |
| | | | |
| | | | |
| | | | |
| | | | |
| | | | |
| | | | |

Solvo:

| Kiu? Tiu! | Kie? Tie! | Kio? Tio! | Kia? Tia! |
|---|---|---|---|
| Marko | en vendejo | aŭto | forta |
| vendisto | sur tablo | kafo | pli rapida |
| sinjorino | en via lernolibro | kuko | la plej bona |
| amiko | en sportejo | letero | pli bela |
| kelnero | sur papero | vizaĝo | riĉa |
| frato | en la hejmo de Marko | domo | malpli granda |
| sportisto | en nia lernoĉambro | lingvo | malvarma |

## M5 Kanto

Kreu frazojn per la ĉi-subaj vortoj. Vi povas aldoni aliajn vortojn.

| | | |
|---|---|---|
| ion – diri – volas | → | Mi volas diri ion. |
| libroj – plaĉas – tiuj | → | |
| amikon – kian – volas | → | |
| aŭto – tiu ĉi – rapide | → | |
| forgesis – Marko – ion | → | |
| iras – lernantoj – kien | → | |

Kreu frazojn per la komputilo. Kreu 5 frazojn ĉiutage; traduku ilin kaj skribu ilin, se ili estas ĝustaj.

# M6 Hejmtasko




**A** Kion vi faras dum la tago?

**B** Je la sepa horo kaj tridek minutoj mi iras en lernejon.

**A** Kion vi faras, dum vi estas en lernejo?

**B** Mi lernas multajn novajn aferojn.

**A** Ĉu vi ŝatas matematikon?

**B** Jes, mi ŝatas ĝin pli multe ol lingvojn. Sed plej multe mi ŝatas muzikon.

**A** Kiam vi revenas hejmen?

**B** Mi revenas je la dekdua horo.

**A** Kie vi tagmanĝas? Ĉu en lerneja manĝejo?

**B** Ne. Hejme mi manĝas bonan manĝon, kiun kuiris mia patrino.

**A** Kaj poste? Ĉu vi ludas kun geamikoj?

**B** Jes, sed unue mi devas lerni kaj skribi hejmtaskojn.

**A** De kiu estas la lernolibroj tie sur la tablo?

**B** Tio estas miaj lernolibroj kaj lernolibroj de mia fratino.

# Bloko 20 (sesioj 39-40)

## Lernoceloj

- ripeti la enhavon de la antaŭaj lecionoj (modalaj verboj, numeraloj, gramatikaj finaĵoj)

## Bezonataj instruiloj

- komputilo por ludi sonon

## Pretigado

- Kopioj de **M7**
- Kopioj de **M8**
- Kopioj de **M9**
- Kopioj de **M10**
- Kopioj de **M11**

## Lernplano

| | |
|---|---|
| 20 min | Disdonu la dialogon **M6**.<br>Dividu la lernantojn en duopojn kaj petu ilin legi la dialogon kaj traduki ĝin. Petu unu duopon laŭtlegi la dialogon kaj traduki ĝin linion post linio. Helpu ilin kun tradukado, se necese. Poste petu tiun duopon ludi la dialogon sen traduki ĝin denove. Se estas tempo, vi povas peti aliajn duopojn ludi la dialogon. |
| 5 min | Nelingva paŭza ludo |
| 10 min | Disdonu **M7**. Petu la lernantojn plenigi la truojn per la ĝusta modala verbo. |
| 10 min | Disdonu **M8**. Petu la lernantojn legi la frazojn kaj traduki ilin al sia lingvo.<br>La lernantoj ripetas komparadon de adjektivoj kaj adverboj. En kelkaj kazoj la prefiksoMAL- estas aldonata (malpli, malplej). |
| 10 min | Paŭzo |
| 5 min | Nelingva paŭza ludo |
| 10 min | Disdonu **M9**. Petu la lernantojn rilatigi la frazojn kun la tempoj. |
| 10 min | Disdonu **M10**. Ĝi estas ekzerco kun la kanto **Dek boteloj**, kiu estis lernita en la leciono 4. Petu la lernantojn aldoni la mankantajn nombrojn al la kanto.<br>Poste kantu la kanton kune 2-3-foje. Tiel la lernantoj ripetos nombrorilatajn vortojn. |
| | Donu hejmtaskojn |

## M7 Dialogo

Plenigu la truojn per la ĝusta verbo: {n}.

Mi petas, ĉu vi ____________ helpi al mi? – Kompreneble!

Hodiaŭ Marko ne ____________ skribi hejmtaskon. Tio plaĉas al li.

Ni havas malnovan aŭton. Ĝi ne funkcias kaj ni ne ____________ vojaĝi plu.

Ana ankoraŭ ne ____________ dormi. Ŝi ŝatas plu legi la libron.

Mia edzo ____________ labori tre longe kiel kelnero.

La sinjoro iras malrapide. Li estas maljuna, li ne ____________ iri pli rapide.

Ĉu vi ____________ fermi la fenestron? – Mi povas, sed mi ne ____________. Estas varme en la ĉambro.

Marko ____________ aĉeti kukon por Ana, sed li ne havas sufiĉan monon.

Ivo ne havas tempon por ludi kun mi. Li ____________ rapide iri en vendejon kaj aĉeti panon.

## M8 Ekzerco

Traduku al via lingvo.

La unua vendisto estas bona. La dua vendisto estas pli bona ol la unua. La tria vendisto estas la plej bona el ĉiuj.

Mia domo estas malgranda. La domo de Marko estas pli malgranda ol mia. La domo de Julia estas la plej malgranda.

La patrino de Ana kuiras bone. La patrino de Marko kuiras pli bone. Mia patrino kuiras plej bone.

Petro lernas lingvojn rapide. Mi lernas lingvojn pli rapide ol li. Mia fratino lernas lingvojn plej rapide el ni ĉiuj.

Tiu ĉi foto estas bela. La dua foto estas malpli bela. La lasta foto estas la malplej bela.

## M9 Ekzerco

Rilatigu la tempon kun la frazoj.

| | |
|---|---|
| 7.30 | Mi revenas hejmen el la lernejo. |
| 8.00 | Post la tagmanĝo mi lernas en mia ĉambro. |
| 12.00 | Mi iras en lernejon. |
| 12.30 | Mi ludas sur la strato kun geamikoj. |
| 14.00 | Mi dormas. |
| 16.00 | Mi manĝas hejme tagmanĝon, kiun kuiris mia patrino. |
| 21.00 | Mi sidas en lernoĉambro kaj mi aŭskultas la instruiston. |

**M10** Ekzerco

**Dek boteloj**

Dek boteloj pendas sur la mur'

Sed se akcidente falas unu nur, tiam naŭ boteloj pendas sur la mur'.

Naŭ boteloj pendas sur la mur' sed se akcidente falas unu nur,

Tiam ok boteloj pendas sur la mur'.

Ok boteloj pendas sur la mur', sed se akcidente falas unu nur,

Tiam sep boteloj pendas sur la mur'.

Sep boteloj pendas sur la mur', sed se akcidente falas unu nur,

Tiam ses boteloj pendas sur la mur'.

____________ boteloj pendas sur la mur', sed se akcidente falas unu nur,

Tiam ____________ boteloj pendas sur la mur'.

____________ boteloj pendas sur la mur', sed se akcidente falas unu nur,

Tiam ____________ boteloj pendas sur la mur'.

____________ boteloj pendas sur la mur', sed se akcidente falas unu nur,

Tiam ____________ boteloj pendas sur la mur'.

____________ boteloj pendas sur la mur', sed se akcidente falas unu nur,

Tiam ____________ boteloj pendas sur la mur'.

Du boteloj pendas sur la mur', sed se akcidente falas unu nur, tiam unu botelo pendas sur la mur'.

Unu botelo pendas sur la mur', sed se akcidente falas unu nur, tiam nur odoro restas sur la mur'.

Melodio: YouTube

## M11 Hejmtasko

Aldonu la ĝustan finaĵon: -j, -n, -jn.

Antaŭ la domo de Marko staras modernaj aŭto____________.

Antaŭ dek minuto____________ venis la patro hejmen.

La botelo____________, kiuj staras sur la tablo en kuirejo, estas miaj.

Donu al mi la grandajn libro____________, kiuj estas tie malantaŭ vi.

Ĉu vi aŭdas mi____________ bone?

Post du horoj la vendisto fermos la vendejo____________.

En lernoĉambro sidas lernanto____________ kaj ili aŭskultas instruisto____________.

Vi havas tre bela____________ okulo____________.

La fotoj, kiuj pendas sur la muro, estas tre bela____________.

Ivo ne komprenas la lastan hejmtasko____________, kiu____________ li ricevis en la lernejo.

Kreu frazojn per la komputilo. Kreu 5 frazojn ĉiutage; traduku ilin kaj skribu ilin, se ili estas ĝustaj.

# Bloko 21 (sesioj 41-42)

## Lernoceloj

- kompreni la sistemon de tabelvortoj (ke tiuj vortoj konsistas el du partoj kaj ke eblas konstrui multajn kombinaĵojn helpe de malmultaj morfemoj)
- lerni krei unuajn tabelvortojn (kombinaĵojn de KI-, TI-, ĈI- kaj -U, -O, -A, -E)
- ekkoni la sufikson -IND-

## Bezonataj instruiloj

- komputilo por ludi sonon, magnetoj

## Pretigado

- Sonoj **4, 5**
- Kopioj de **M12**
- Ekzerco **M13**
- Ekzerco **M14**
- Ekzerco **M15**
- Kopioj de **M16**
- Ekzerco **M17**
- Kopioj de **M18**
- Kopioj de **M19**

## Novaj vortoj

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| forta | = | forta | jaro | = | jaro |
| veturi | = | veturi | multe | = | multe |
| tre | = | tre | monato | = | monato |
| ĉiuj | = | ĉiuj | bedaŭri | = | bedaŭri |
| certe | = | certe | plena | = | plena |
| jam | = | jam | aĉeti | = | aĉeti |
| kosti | = | kosti | -ind | = | -ind |

## Lernplano

| | |
|---|---|
| 15 min | Disdonu **M12** kaj aŭskultu Sonon **4**. Legu kaj traduku la tekston kune. Petu lernantojn legi po 2 frazoj kaj traduki ilin denove. Kiam ili atingas finon de la teksto, ili rekomencas sed ĉi-foje sen traduko. La instruisto helpas nur kun ĝusta elparolo kaj, se necese, kun tradukado. |
| 5 min | Klarigu mallonge la uzadon de la sufikso -IND- kaj donu kelkajn ekzemplojn.<br><br>Disdonu **M13**. Helpu la lernantojn krei vortojn kun la sufikso -IND- kaj petu ilin provi uzi ilin en frazoj.<br><br>Vi povas atentigi pri la vorto nedankinde, kiu estas uzata en ĝentila frazo. Kiel ekzemplon vi povas citi la jenan konversacion:<br><br>- Ĉu vi povas helpi al mi?<br>- Jes.<br>- Dankon!<br>- Nedankinde! |
| 5 min | Nelingva paŭza ludo |
| 10 min | Disdonu **M14**. Petu la lernantojn pensi pri la signifo de la vortoj kun la sufikso-IND-. Poste petu ilin krei almenaŭ tri sencohavajn frazojn. Se vi havas tempon, kelkaj lernantoj povas laŭtlegi siajn rezultojn kaj vi povas priparoli ilin. |
| 10 min | Disdonu **M15**. Petu la lernantojn atenteme legi la tekston kaj traduki ĝin al Esperanto. Donu ĉ. 5 minutojn por plenumi la taskon. Poste petu unu el la lernantoj legi la tradukon al la klaso. Vi povas peti aliajn pri alternativoj kaj fari sugestojn. Skribu la ĝustan tradukon sur la tabulon. |
| 10 min | Paŭzo |
| 15 min | Disdonu la dialogon **M16**.<br><br>Dividu la lernantojn en duopojn kaj petu ilin legi la dialogon kaj traduki ĝin. Petu unu duopon laŭtlegi la dialogon kaj traduki ĝin linion post linio. Helpu ilin kun tradukado, se necese. Poste petu tiun duopon ludi la dialogon sen traduki ĝin denove. Se estas tempo, vi povas peti aliajn duopojn ludi la dialogon. |
| 5 min | Nelingva paŭza ludo |
| 15 min | Disdonu la dialogon **M17**.<br><br>Per magnetoj metu la puzlerojn sur la tabulon. Uzu la puzlon por klarigi la sistemon de tabelvortoj. Poste petu la lernantojn kunmeti diversajn tabelvortojn kaj pensi pri iliaj signifoj.<br><br>Atentigu la lernantojn pri la simileco inter la vortoj en kiu – tiu, kie – tie, ktp. Nun unu simila vorto estas aldonita al ĉiu paro: kiu – tiu – ĉiu, kie – tie – ĉie, ktp. |
| 10 min | Disdonu **M18**. Petu la lernantojn ekscii, kiuj puzleroj taŭgas en kiuj frazoj. |
| | Donu hejmtaskojn |

## M12 Teksto

**Nova aŭto (2-a parto)**

– Ĉu ĝi estas ankaŭ forta?

– Ho jes, ĝi estas tre forta.

– Certe ĝi estas multekosta?

– Kompreneble, ĝi estas la plej multekosta el ĉiuj.

– Dankon, bedaŭrinde mi ne aĉetos novan aŭton, ĉar mia malnova aŭto estas la plej malmultekosta el ĉiuj. Mi ankoraŭ veturos per ĝi.

## M13 Ekzerco

Kunligu la vortojn kun la finaĵo -IND- kaj faru frazon.

| | | |
|---|---|---|
| aĉeti | aĉetinda | La ruĝa aŭto estas aĉetinda. |
| lerni | lerninda | |
| vidi | vidinda | |
| danki | nedankinde! | |
| | | |

## M14 Ekzerco

Kreu sencohavajn demandojn. Skribu ilin.

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Ĉu<br>Kie<br>Kiam<br>Kiel | la nova filmo<br>Esperanto<br>tiu ĉi libro<br>via kafo<br>la kanto<br>matematiko<br>la letero de Marko<br>la parolo de Ana<br>la manĝo en restoracio<br>la aŭto de via amiko | estas<br>povas esti | vidinda<br>leginda<br>lerninda<br>havinda<br>aĉetinda<br>kuirinda<br>trinkinda<br>manĝinda<br>aŭskultinda<br>kantinda | ? |

## M15 Tradukekzerco

Traduku al Esperanto.

La patrino demandis min, kie mi havas ĉiujn lernolibrojn. Mi diris, ke ili estas ie en mia ĉambro. Mi serĉas Esperanto-lernolibron. Kien mi metis matematiko-lernolibron? Kiel mi lernos hodiaŭ?

## M16 Dialogo




**A** Ĉu vi ŝatas vojaĝi?

**B** Jes, mi multe ŝatas vojaĝi. En ĉi tiu jaro mi volas veturi en Slovakion.

**A** Kiel vi volas veturi?

**B** Per mia aŭto.

**A** Ĉu vi veturos longe de Zagrebo al Slovakio?

**B** Certe, eble kvin horojn.

**A** Kiun urbon vi volas vidi?

**B** Mi volas vidi Bratislavon. Kaj certe ankaŭ Partizánske.

**A** Ho! Ĉu Partizánske estas vidinda?

**B** Kompreneble, ĝi estas bela malgranda urbo. Loĝas tie multaj homoj, kiuj parolas Esperanton.

**A** Mi bedaŭras ke mi ne povas iri kun vi.

**B** Mi aĉetos ion belan por vi.

**A** Dankon! Ĉu vi havas multajn dolarojn?


**B** En Slovakio mi devas havi ne dolarojn, sed eŭrojn.

ki ti ĉi

o u a e

**M18** Ekzerco

Eksciu, kiuj puzleroj taŭgas en la jenaj frazoj.





Diru, ki__________ sidas en la kafejo? – Marko kun Ana.

Ki__________ sinjoro staras sur la strato? – Maljuna.

Mi ne volas sidi ti__________. Mi serĉos alian lokon.

Mi ŝatas manĝi vere ĉi__________n.

Ĉi__________j lernantoj sidas kaj skribas.




__________u foto ne plaĉas al Ivo, ĉar ĝi estas malnova.

Marko ne scias, __________e estas liaj lernolibroj.

En la laborejo __________uj sidas kaj laboras, nur mi trinkas kafon.

La kafo por mi devas esti tre varma. Mi ŝatas trinki__________an kafon.

La patrino koleras: "__________e estas viaj paperoj! En via ĉambro, en kuirejo, sur la tablo..."

## M19 Hejmtasko

Faru similan frazon. Anstataŭigu la dikan vorton per alia.

| | |
|---|---|
| ekzemplo:<br>Multaj homoj en Slovakio parolas la **slovakan** lingvon. | ...la Esperantan lingvon.<br>...la germanan lingvon. |
| Mi bedaŭras, ke vi forgesis la **libron** hejme. | |
| Sur tiu strato staras **hotelo**. | |
| Kiuj lernantoj **sidas** en la lernejo? | |
| Mi **volas** vojaĝi ien, kie estas belaj urboj. | |
| Mi ne scias, ke Julia **skribis** al mi leteron. | |

Kreu frazojn per la komputilo. Kreu 5 frazojn ĉiutage; traduku ilin kaj skribu ilin, se ili estas ĝustaj.

# Bloko 22 (sesioj 43-44)

## Lernoceloj

- lerni novajn tabelvortojn, kiuj finiĝas per -AM kaj komenciĝas per I- kaj NENI-
- ripeti la jam lernitajn afiksojn
- ripeti verbojn el la antaŭaj lecionoj kaj uzi ilin en frazoj

## Bezonataj instruiloj

- komputilo por ludi sonon


## Pretigado

- Sono **6**
- Kopioj de **M20**
- Ekzerco **M21**
- Ekzerco **M22**
- Kopioj de **M23**

## Lernplano

| | |
|---|---|
| 5 min | Nelingva paŭza ludo |
| 20 min | Disdonu **M20**. Ludu Sonon **6** per la komputilo. Petu la lernantojn atenteme aŭskulti kaj plenigi la mankantajn vortojn.<br>Dividu la lernantojn en duopojn kaj petu ilin legi la dialogon kaj traduki ĝin. Petu unu duopon laŭtlegi la dialogon kaj traduki ĝin linion post linio. Helpu ilin kun tradukado, se necese. Poste petu tiun duopon ludi la dialogon sen traduki ĝin denove. Se estas tempo, vi povas peti aliajn duopojn ludi la dialogon.<br>Klarigu la signifon de la novaj tabelvortoj: neniam, kiam, tiam. Aldonu ankaŭ vortojn, kiuj komenciĝas per I-. Tiuj vortoj aperis en la antaŭaj lecionoj: io, ie, iu, ktp. Vi povas uzi la puzlon kun -AM, I- kaj NENI- por ilustri la uzon. |
| 10 min | Paŭzo |
| 10 min | Disdonu **M21**. Dividu la lernantojn en tri- aŭ kvaropojn. Petu ilin asocii la esprimojn kun tabelvortoj.<br>Se vi volas, vi povas fari etan konkuron kaj peti la grupojn plenumi la taskon laŭeble plej rapide. La plej rapida grupo gajnas la konkuron. |
| 10 min | Disdonu **M22**. Mallonge rememorigu pri la uzado de la afiksoj -IND-, MAL-, -EJ-, RE-, -EBL-, se necesas. Poste petu la lernantojn plenigi la truojn per la mankantaj afiksoj. Legu la tekston kune kaj priparolu la respondojn. |
| 5 min | Nelingva paŭza ludo |
| | Donu hejmtaskojn |

# M20 Dialogo



**Ana** Saluton, Maja!

**Maja** Saluton, Ana! Mi ______________ ke vi venis. Bonvolu eniri!

**Ana** Dankon! Mi ______________ neniam vidis ĉi tiun urbon. Vi havas tre belan domon.

**Maja** Ĉi tie estas mia ĉambro. Ĉu mi povas porti por vi sukon?

**Ana** Jes, multan ______________. Dum la vojo mi ne trinkis.

**Maja** Mi portis ankaŭ kukon. Ĝi estas ankoraŭ ______________, mi faris ĝin antaŭ unu horo.

**Ana** La kuko estas tre bona!

**Maja** Mi ĝojas. Mi skribos por vi sur paperon, kiel oni faras ĝin.

**Ana** ______________ estas sur la foto, kiu pendas ______________ sur la muro?

**Maja** Tio estas foto de mi, miaj ______________ kaj miaj gepatroj.

**Ana** Kiam oni faris tiun ĉi foton?

**Maja** Antaŭ tri jaroj. Tiam mia ______________ frato iris la unuan fojon en lernejon.

## M21 Ekzerco

Metu la esprimojn en la ĝustan grupon: mia amiko, instruistino, nun, en Esperanto-lernolibro, en Slovakio, nova kuiristo, sur la tablo, kelnerino, post dudek minutoj, sur via vizaĝo, la patro de Ana, en la malnova aŭto, en lasta tago de la jaro, en mia hejmo, en la malplena botelo, komence de aprilo, ĉie, je la sepa horo, iu, iam, via frato, la plej juna lernanto, en tiu ĉi monato

| **Kiam? Tiam!** | **Kie? Tie!** | **Kiu? Tiu!** |
|---|---|---|
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |

## M22 Ekzerco

Plenigu la truojn per la ĝusta elemento: -ind-, mal-, -ej-, re-, -ebl-. Ĉiu elemento estu uzata dufoje.

Mi volas jam esti hejme. Ne plaĉas al mi en malsanul__________o.

Ĉu estas io en la boteloj en kuirejo? – Ne, ĉiuj estas __________plenaj.

En sport__________o estas malvarme.

Kiel okazis al vi la akcidento? – La biciklisto ne estis en nokto bone vid__________a.

Marko parolis, ke Vieno estas vizit__________a urbo.

Peter donis manĝon al __________riĉulo, kiu sidis sur la strato.

Mi ne komprenas la hejmtaskon. Mi devas __________legi ĝin.

Ĉu vi povas helpi al mi? – Kompren__________e!

Ivo aĉetis por sia fratino tre leg__________an libron.

Mi malĝojas, ke vi devas jam iri hejmen. Kiam ni __________vidos unu la alian?

## M23 Hejmtasko

Plenigu la truojn per la ĝusta verbo: falis, okazis, kanti, redoni, forgesi, devas, dormas, bedaŭras, aŭskulti, rigardas. Ĉiu verbo povas esti uzata nur unufoje. Traduku la frazojn al via lingvo.

Vi faris nur unu taskon. Sed vi ________________ fari du taskojn.

Mi ________________, sed ni ne estas hejme. Ni ĉiuj estas en laborejo.

Kien ________________ la libro? – Malantaŭ la skribotablon.

Ĉu mi povas ________________ kun vi iun belan kanton?

Ana ________________ ĉiam nur amfilmojn.

Tio ________________ hodiaŭ en lernejo.

Kiam vi povas ________________ al mi la libron?

Mi vere ne scias, kian muzikon ________________ Petro.

Je tiu nokta horo mi jam ________________.

Kiel vi povis ________________ mian nomon?

Kreu frazojn per la komputilo. Kreu 5 frazojn ĉiutage; traduku ilin kaj skribu ilin, se ili estas ĝustaj.

# Bloko 23 (sesioj 45-46)

## Lernoceloj

- ripeti nombrojn lernante kiel diri tempon laŭ horloĝo
- ekkoni novajn tabelvortojn finiĝantajn per EL-, -AL kaj -OM

## Bezonataj instruiloj

- komputilo por ludi sonon

## Pretigado

- Sonoj **7, 8, 9**
- Kopioj de **M24**
- Ekzerco **M25**
- Ekzerco **M26**
- Ekzerco **M27**
- Kopioj de **M28**
- Kopioj de **M29**

## Novaj vortoj

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| dum | = | dum | kial | = | kial |
| tempo | = | tempo | ĉar | = | ĉar |
| tion | = | tion | kiom | = | kiom |
| vivi | = | vivi | edzo | = | edzo |
| sed | = | sed | kie | = | kie |
| kiel | = | kiel | sendi | = | sendi |
| tiun | = | tiun | | | |

## Lernplano

| | |
|---|---|
| 15 min | Disdonu la tekston **M24** kaj aŭskultu la sonon **7**.<br>Legu kaj traduku ĝin kune. Petu lernantojn legi po 2 frazoj kaj traduki ilin denove. Kiam ili atingas finon de la teksto, ili rekomencas sed ĉi-foje sen traduko. La instruisto helpas nur kun ĝusta elparolo kaj, se necese, kun tradukado. |
| 5 min | Disdonu **M25**. Petu la lernantojn legi la frazojn kaj konekti ilin kun la taŭgaj tempoj sur la horloĝo. |
| 5 min | Nelingva paŭza ludo |
| 10 min | Klarigu la signifon kaj uzon de tabelvortoj finiĝantaj per -EL, -AL kaj -OM. Vi povas krei vian propran puzlon (kiel en **M19**) por ilustri la uzon de tiuj finaĵoj. |
| 10 min | Paŭzo |
| 10 min | Disdonu **M26**. Dividu la lernantojn en tri- aŭ kvaropojn. Petu ilin asocii la esprimojn kun tabelvortoj.<br>Se vi volas, vi povas fari etan konkuron kaj peti la grupojn plenumi la taskon laŭeble plej rapide. La plej rapida grupo gajnas la konkuron. |
| 10 min | Disdonu **M27**. Petu la lernantojn plenigi la truojn per la ĝustaj tabelvortoj. |
| 5 min | Nelingva paŭza ludo |
| 10 min | Disdonu la dialogon **M28**.<br>Dividu la lernantojn en duopojn kaj petu ilin legi la dialogon kaj traduki ĝin. Petu unu duopon laŭtlegi la dialogon kaj traduki ĝin linion post linio. Helpu ilin kun tradukado, se necese. Poste petu tiun duopon ludi la dialogon sen traduki ĝin denove. Se estas tempo, vi povas peti aliajn duopojn ludi la dialogon. |
| | Donu hejmtaskojn |

## M24 Teksto

**Nova aŭto (3-a parto)**

Dum li tion diris, li denove rigardis la belan sinjorinon. Sed la vendisto diris:

– Estos pli bone, ke vi ne rigardu tiun ĉi sinjorinon. Ankaŭ ŝi estas tre multekosta. Mi scias, ĉar mi estas ŝia edzo.

M25 Ekzerco

Kioma horo estas? Legu la frazojn kaj kunligu ilin kun la ĝusta tempo.

Estas la kvina horo.




Estas la dektria horo kaj dudek minutoj.




Estas dek minutoj antaŭ la sesa horo.




Estas kvin minutoj post la kvara horo.



## M26 Ekzerco

Metu la esprimojn en la ĝustan grupon: ĉar vi estas mia amiko, ĉiel, neniom, sep eŭrojn, dudek jarojn, malvarme, ĉar mi devas iri en lernejon, ĉar mi forgesis ion, kolere, ĉar mi ne komprenas ion, ĉar li ne volas manĝi, trankvile, tial, malmulte, per via aŭto, kvardek unu, tri horojn, per biciklo

| **Kial? Tial!** | **Kiel? Tiel!** | **Kiom? Tiom!** |
|---|---|---|
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |

## M27 Ekzerco

Plenigu la vortojn per unu el la jenaj vortoj: kiel, kial, kiom.

Saluton! Longe mi ne vidis vin. ____________ vi fartas? – Bone, dankon.

Julia, ____________ vi ne volas iri kun mi en kinejon? – Ĉar mi devas multe lerni.

Sinjoro vendisto, ____________ kostas tiu ĉi biciklo? – Ĝi kostas 200 eŭrojn.

____________ vi volas, ke mi fermu la fenestron? – Ĉar estas malvarme en la ĉambro.

Ĉu ni povas unu horon trankvile sidi kaj trinki sukon? – Mi ne scias, ____________ da tempo ni havas.

Ĉu vi vojaĝos per aŭto? – Ne, mi volas vojaĝi tiel, ____________ vi: per biciklo.

Mi ne komprenas, ____________ vi estas kolera. – Mi estas kolera, ĉar vi legis miajn leterojn.

Diru, ____________ estas naŭ plus ok? – Dek sep.

____________ vi fariĝis ruĝa? – Mi forgesis mian monon hejme.

____________ oni kuiras tiun ĉi manĝon? – Tre facile. Mi skribos tion al vi sur papero.

# M28 Dialogo



| | |
|---|---|
| **Marta** | Saluton, Lucia! Kiel vi fartas? |
| **Lucia** | Saluton, Marta! Mi fartas tre bone, dankon. Kaj vi? |
| **Marta** | Ankaŭ mi bone. |
| **Lucia** | Dum longa tempo mi ne vidis vin. Kie vi nun vivas? |
| **Marta** | Mi ne plu vivas en Ĉeĥio. Jam unu monaton mi vivas kaj laboras en Slovakio. |
| **Lucia** | Ho, interese! Kiel plaĉas al vi via nova laboro? |
| **Marta** | Mi ŝatas ĝin. Ĝi estas pli bona kaj pli interesa ol la malnova laboro. |
| **Lucia** | Tio estas bona. Mia edzo koleras pri mia laboro. |
| **Marta** | Kial? |
| **Lucia** | Ĉar mi devas en ĉiu tago labori tre longe. |
| **Marta** | Kien vi iras? |
| **Lucia** | Mi iras sendi leteron kaj poste trinki kafon. Ĉu vi volas iri kun mi? |
| **Marta** | Kompreneble. |
| **Lucia** | Bone! Ni devas paroli kune pri multaj aferoj, kiuj okazis. |

## M29 Hejmtasko

Asociu la demandojn kun la respondoj. Traduku al via lingvo.

| | |
|---|---|
| Kiom da boteloj staras sur la tablo? | En Zagrebo. |
| Kie vivis edzino de la vendisto? | Ĉar mi ne konas la respondon. |
| Kiel Petro volas veturi? | Unu aŭto veturis tre rapide. |
| Kiel okazis la granda akcidento sur la strato? | Tre multaj. |
| Kial vi nenion diras? | Per biciklo. |

# Bloko 24 (sesioj 47-48)

## Lernoceloj

- ripeti la tabelon de tabelvortoj
- kompreni ke iuj tabelvortoj povas ricevi la akuzativan finaĵon -N

## Bezonataj instruiloj

- komputilo por ludi sonon, ruĝaj kaj verdaj kartoj

## Pretigado

- Sono **10**
- Ekzerco **M30**
- Kopioj de **M31**
- Kopioj de **M32**
- Ekzerco **M33**
- Koloraj vortkartoj **M34**
- Kopioj de **M35**
- Kopioj de **M36**

## Lernplano

| | |
|---|---|
| 10 min | Disdonu **M30**. Petu la lernantojn trovi la mankantan vorton. Ili povas elekti inter tri ebloj. |
| 5 min | Nelingva paŭza ludo |
| 20 min | Disdonu **M31**. Ludu Sonon **10** per la komputilo. Petu la lernantojn atenteme aŭskulti kaj plenigi la mankantajn vortojn.<br>Dividu la lernantojn en duopojn kaj petu ilin legi la dialogon kaj traduki ĝin. Petu unu duopon laŭtlegi la dialogon kaj traduki ĝin linion post linio. Helpu ilin kun tradukado, se necese. Poste petu tiun duopon ludi la dialogon sen traduki ĝin denove. Se estas tempo, vi povas peti aliajn duopojn ludi la dialogon.<br>Certigu, ke la lernantoj komprenu la signifon de la teksto. Se kelkaj ne komprenas ĉiujn tabelvortojn, vi povas klarigi iliajn signifojn per la puzlo. |
| 10 min | Paŭzo |
| 10 min | Disdonu **M33**. Petu la lernantojn fari frazojn pri la vortoj markitaj dike. Konsciigu ilin pri la graveco de la akuzativa finaĵo -N.<br>Se estas tempo, ili povas formi duopojn kaj demandi unu la alian la demandojn kaj respondi. |
| 10 min | Disdonu **M34**. Dividu la lernantojn en kelkajn grupojn. Klarigu la regulojn de la ekzerco kaj konsciigu la lernantojn, ke la tabelvortoj povas kelkfoje ricevi la akuzativan finaĵon -N. Donu al ĉiu grupo aron da ruĝaj kaj verdaj kartoj. Unu lernanto el ĉiu grupo prenas po unu karton el ĉiu kartaro. Poste ĉiu lernanto en la grupo skribas sian frazon enhavantan la tabelvorton kaj la verbon. Poste la sekva lernanto prenas po unu karton el ĉiu kartaro kaj ili ĉiuj skribas sian frazon. Daŭrigu tiel ĝis ĉiuj lernantoj havas la eblon preni kartojn. Se estas sufiĉe da tempo, vi povas legi kaj kompari kelkajn frazojn.<br>Ruĝaj kartoj (tabelvortoj): kio, kiu, nenion, neniu, neniam, ĉiuj, ĉio, ĉiam, tion, iu, iam<br>Verdaj kartoj (verboj): havas, skribas, legas, forgesas, vidas, montras, demandas, estas, staras |
| 5 min | Nelingva paŭza ludo |
| 15 min | Ripetu la esprimojn por saluti kaj prezentiĝi. Dividu lernantojn en duopojn kaj petu ilin skribi propran dialogon pri konatiĝo kun iu. Ili povas uzi malsamajn salutesprimojn, demandi pri la nomo, aĝo aŭ lando de la alia persono aŭ io ajn alia, pri kio ili pensas. Vi povas ankaŭ skribi ekzemplajn frazojn sur la tabulon kiel ideojn.<br>Ekzemploj:<br>Kio estas via nomo?<br>Kiel vi fartas?<br>Kiom da jaroj vi havas?<br>De kie vi estas?<br>Kie vi vivas? |
| 5 min | Disdonu **M35**. Petu la lernantojn traduki la kanton kune kaj kantu ĝin kune 2-3-foje. |
| | Donu hejmtaskojn |

## M30 Ekzerco

Elektu la ĝustan vorton.

Sinjoro Rapid demandis la vendiston, ________ (kiel, kiom, kia) kostas la bela ruĝa aŭto.

Mi volas paroli Esperanton ________ (iu, neniam, tiel) bone kiel vi.

Mi koleras, ĉar vi ________ (tio, iel, neniam) fermas la pordon de nia ĉambro.

Ivo ŝatas aŭskulti ________ (tian, ion, iam) muzikon kiel mi.

Post kvar monatoj ________ (ĉiam, ĉiuj, tiam) revenis hejmen.

________ (Kiu, Kiel, Kial) estas la simpatia sinjorino tie malantaŭe?

Mi ne komprenas, ________ (kial, ĉial, nenial) neniu venis.

Vi havas tre belan voĉon. Bonvolu kanti ________ (ion, ĉien, io).

Peter ankoraŭ ________ (tie, kiam, neniam) veturis al Parizo.

Malgrandaj infanoj volas manĝi ________ (tiu, ĉion, tial) en ĉambro.

## M31 Dialogo

**A** Ho, mi ne havas ____________ de matematiko.

**B** Pardonu, kion vi diris? Mi ne aŭdis vin.

**A** Mi diris, ke mi forgesis mian lernolibron.

**B** Kiun lernolibron? Ĉu ____________?

**A** Ne ĉiujn. Nur tiun, en kiu estas matematikaj taskoj.

**B** Kaj ____________ ĝi estas?

**A** Mi ne scias. Eble hejme, ie en mia ĉambro.

**B** Ĉu vi serĉis ĉie?

**A** Kompreneble, sed la libro estas ____________.

**B** ____________ estas mia lernolibro. Vi povas labori kun ĝi.

**A** Multan dankon!

**B** Ho, ankaŭ mi ____________ ion.

**A** Kion?

**B** Lernolibron de Esperanto. Kiel mi legos la novan tekston sen ĝi?

**A** Tiun lernolibron mi havas. Vi povas legi la tekston el ĝi.

**B** Dankon! ____________ bone, ke ni sidas kune!

## M32 Dialogo




**A** Ho, mi ne havas **lernolibron** de matematiko.
**B** Pardonu, kion vi diris? Mi ne aŭdis vin.
**A** Mi diris, ke mi forgesis mian lernolibron.
**B** Kiun lernolibron? Ĉu **ĉiujn**?
**A** Ne ĉiujn. Nur tiun, en kiu estas matematikaj taskoj.
**B** Kaj **kie** ĝi estas?
**A** Mi ne scias. Eble hejme, ie en mia ĉambro.
**B** Ĉu vi serĉis ĉie?
**A** Kompreneble, sed la libro estas **nenie**.
**B** **Ĉi tie** estas mia lernolibro. Vi povas labori kun ĝi.
**A** Multan dankon!
**B** Ho, ankaŭ mi **forgesis** ion.
**A** Kion?
**B** Lernolibron de Esperanto. Kiel mi legos la novan tekston sen ĝi?
**A** Tiun lernolibron mi havas. Vi povas legi la tekston el ĝi.
**B** Dankon! **Kiel** bone, ke ni sidas kune!

## M33 Ekzerco

Faru demandojn pri la dikaj vortoj. Atentu pri la akuzativa finaĵo-N.

| | | |
|---|---|---|
| La lasta tago de la jaro estis **tre malvarma**. | → | Kia estis la lasta tago de la jaro? |
| La geedzoj iris **en la restoracion**. | → | Kien iris la geedzoj? |
| **Petro** trinkis tre bonan kafon en restoracio. | → | |
| Kelnero rapide alportis **al Julia** varman kafon. | → | |
| Ivo veturis en Slovakion **per aŭto**. | → | |
| Sur tiu ĉi strato staras **la plej multekosta** hotelo. | → | |
| La instruistino donis al lernantoj **malfacilan taskon**. | → | |
| La libro, kiun vi volas aĉeti, kostas **15 eŭrojn**. | → | |
| Julia **lernas** novajn lingvojn rapide. | → | |
| **Je la tria horo** mi ludas kun mia malgranda frato. | → | |
| Julia estas en malsanulejo, **ĉar ŝi falis**. | → | |
| Tra **la pordo** venas miaj geamikoj. | → | |

| | |
|---|---|
| kio | kiu |
| nenion | neniu |
| neniam | ĉiuj |
| ĉio | ĉiam |
| tion | iu |
| iam | |

| | |
|---|---|
| havas | skribas |
| legas | forgesas |

| | |
|---|---|
| vidas | montras |
| demandas | estas |
| staras | |

## M35 Kanto

**Jomo: Ĉu vi volas min?**

Ho, kion vi faras? demandas nun Marko.

Mi legas la libron, mi lernas la lingvon.

Ĉu kun mi vi venos al kafo amika?

Vi trinkos la kafon, parolos kun mi.

Mi dankas, ho Marko, mi ŝatas la kafon,

se ĝi estas bona, se ĝi estas varma.

Mi tre ŝatas sidi kun vi en la ĉambro,

sed nun mi ne povas, mi diras al vi.

Melodio: esperantofre.com



## M36 Hejmtasko

Kompletigu la frazojn.

Ki________________ el tiuj du libroj estas pli facila?

Ti________________ filmon mi rigardis jam antaŭ kvar jaroj. Ĝi ne estas bona.

Ki________________ estas la letero, kiun Ana skribis al mi? Mi serĉas ĝin jam du horojn.

Ne ĉio, ki________________ oni diras, estas vero.

Ĉu vi ne vidis, ke la sinjorino falis? Kial vi nen________________ faris?

Ki________________ kantojn vi ŝatas aŭskulti? – Novajn.

Ki________________ ni revidos unu la alian? – Post unu monato.

Oni diras, ke en urbocentro oni malfermos plian vendejon. Ĉu t________________ estas vero?

Neni________________ vi havas tempon por iri kun mi en kinejon!

Ĉu vi ne koleras, ke vi nun devas vivi en alia urbo? – Ne. T________________ estas la vivo.